


65-a jaro n-ro 185 2024:1

la lampiro



**Prokrastemo -
fenomeno de nia erao**



Erno estas cigana knabo, kiu loĝas en urbeto de Hungario. Unu tagon li vidas en la televido knabinon parolantan kun ĵurnalistoj. Ŝi estas Roza, unu el la infanoj kiuj travivis la ŝtelon de la fama diamanto Blua Sonĝo. Li decidas, ke li bezonas konatiĝi kun tiu inteligenta, kuraĝa kaj bela knabino, tamen li ne scias, ke tiu deziro metos lin en la mezon de terorisma operacio, en Budapeŝto, la vidinda ĉefurbo dividita de la rivero Danubo.

Enhavo

- 4 | **Vortoj de la redaktanto**
Invito al renovigo
- 5 | **Iom da rido**
Papilio en Babelo
- 6 | **Kino kaj aliaj artoj**
Barbie
- 8 | **Iom da Filozofio**
Imaga interparolo kun filozofoj:
Taleso el Mileto
- 10 | **Kovrilartikolo**
Prokrastemo - fenomeno de nia
erao
- 12 | **Mia korto, mia sorto**
Parto 2 - Kompoŝtado
- 15 | **Iom da poezio**
Pluen
- 16 | **Movade**
Inteligenta domo
- 18 | **Rakonte**
La pilgrimanta sanktulo
- 20 | **El mia vidpunkto**
Ankoraŭ pri memsa sano
- 21 | **Iom da gramatiko**
Lingvaj Respondoj

la lampiro

65-a jaro n-ro 185 2024:1

Organo de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

Redaktanto: Paulo Sergio Viana
(psviana@terra.com.br)

Enpaĝigo: José Roberto Tenório

*La redaktanto ne respondecas
pri la subskribitaj artikoloj*



Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

Fondita en la 29-a de marto 1937

Propra sidejo

Rua Faustolo, 124 - Água Branca
05041-000 São Paulo, SP - Brazilo
easp.org.br | contato@easp.org.br

Estraro

Prezidanto: Esmeraldo A. Alencar de Lima
Vicprezidantino: Cristina de Claudia Graaf
Sekretariino: Maria Conceição Rodrigues
Kasisto: José R. Tenorio da Silvas

Konsilantaro

Paulo Sergio Viana
José Mauro Progiante

Anstataŭanto

Audino Castelo Branco

Jarkotizo por 2024

Simpla Membro	R\$ 200,00
Subtena Membro	R\$ 400,00
Ŝtatinterna Membro	R\$ 100,00

Invito al renovigo

Iom ŝablone, sed ne tute malvere, oni kutimas aserti, ĉiun komencon de nova jaro:

“Nova Jaro, Nova Vivo!”

Nu, se oni forigas la aplombon, eble restas iom da deziro renovigi niajn agadojn, trovi novajn vojojn, krei ion nekutiman. Ĉu oni sukcesas? Ĉi tio estas alia demando.

Ĝi validas ankaŭ por nia revuo. Ni ŝatus renovigi ĝin, modernigi kaj

aktualigi ĝian enhavon, igi ĝin pli alloga al homoj de la 21-a jarcento, konektitaj al teknologio kaj scienco. Kaj Esperantistoj ja estas avangarduloj, rilate kulturon!

Por fari tion, ni bezonas vin, kara leganto, ni bezonas viajn kritikojn kaj sugestojn. Kaj ankaŭ vian verkemon, ĉar finfine ne sufiĉas kritiki, ĉu ne?

Ĉu vi akceptas nian inviton?



24/02/2024 na sede da EASP: Rua Faustolo, 124 - São Paulo/SP às 15h



Hispano diras: "La plej dolĉa lingvo estas la hispana. Prenu ekzemple la vorton por papilio, *mariposa*. Ĉu la hispana ne aspektas dolĉega lingvo? Tio povus esti la nomo de romantika junulino."

"Tamen ne!", objetas anglo. "Nia lingvo estas la plej dolĉa el la lingvoj. Pensu nur pri nia papilio: *butterfly* [BÂrerflaj]. Tio estas kiel 'muŝo de la butero' kaj la butero mildigas la vorton."

"Nu, la belsoneco estas tute nia", respondas franco. "Flugigu nian papilion per *papillon* [papijon'], *papillon*... la vorto kvazaŭ sentigas la dolĉan flugantan sonon de sonorilo..."

Greko staras kaj parolas reveme: "Pensu nur pri la poezieco de nia greka lingvo... Nia papilio estas *πεταλούδα* [petaluda], kun la sama etimologio de "petalo". Libera, la vorto sonas kiel fluganta floro..."

Italo ridas: "Aŭskultu la konsonantojn de nia papilio, *farfalle*. F-r-f-l-l aspektas kvazaŭ la flugilbato de papilio".

En tiu momento germano, kiu restis ĝis tiam silenta, frapas la tablon kaj krias: "Kion vi havas kontraŭ la dolĉeco de nia vorto *Schmetterling* [ŝMEterling]?!?!"

(El la itala lingvo reverkis
James R. Piton)

Barbie

Originala titolo: Barbie

Reĝisoro: Greta Gerwig

Aktoroj: Margot Robbie, Ryan Gosling, America Ferreira kaj Will Ferrel

Lando: Usono

Dato de lanĉo: 20.06.2023 en Brazilo

Tempo: 114 min

En tiu ĉi artikolo, mi parolos pri tre kurioza kaj rozkolora filmo, kiun mi delonge volis spekti. Jes, temas pri la filmo Barbie. Ĝi estis ĉirkaŭita de kelkaj plendoj, misinformoj kaj multe da juĝado. Sed, fine ĝi aperas kaj estas multe preparolata lastatempe. Kiel vi povas imagi, ĝi estas kiel vojaĝo al infanaĝo por multaj spektantoj, vekante sentojn de empatio kaj nostalgio.

Sen pli prokrasti, ni ekparolu pri la filmo. Je la komenco, ĝi montras la perfektan mondon de Barbie en Barbie-lando. Ŝi estas tipa Barbie. Ekde la komenco de la filmo montriĝas



ke ŝi konscias pri tiu aspekto de ŝi, kaj tial ŝi nomas sin “kliŝa Barbie”. Rimarkeblas ke en tiu mondo de Barbie, la genroj estas montrataj je tre kliŝa maniero, eĉ parodieca, troigante la agojn. Ĉio estas scenigita.

Do, eventuale, strangaj aferoj okazas kaj damaĝas la perfektecon de

tiu mondo - Barbie komencas pensi pri morto. De tiam, ĉio komencas fuŝiĝi en la perfekta ĉiutagaĵo de Barbie. Oni povas rilatigi tiun parton, al tre bona maniero pri kiel obsedaj pensoj en-trudiĝas en la menson.

Tiam, ŝi decidas renkontiĝi kun “stranga Barbie”, kiu vivis iom izolita de la aliaj pro sia strangeco. Ŝajne, estis ŝia nura ebleco solvi siajn nunajn problemojn. Tial, ŝi funkcias iom kiel psikologo aŭ psikanalizisto. Kaj tiam, ekas granda vojaĝo aŭ aventuro en esplorado pri tio kio okazas, la obsedaj pensoj kaj tiuj ŝanĝoj.

Barbie tiam devas iri al la reala mondo kaj renkontiĝi kun la persono kiu ludas kun ŝi, kaj kompreni kio okazas. Pro ilia “konekto”, ŝajne io en la realeco iel influas tion kio okazas al ŝi. Kaj tiam ekas kleriga promenado por Barbie, kie ŝi multe malkovros pri si mem, kaj la realeco.

Tiu filmo estas tre grava nuntempe pro tio ke ĝi klare montras pri la kondiĉoj de virinoj en tiu ĉi mondo, ĝiaj rilatoj de povo kaj aliaj aspektoj. Malgraŭ tio, ke ĝi estas komedia kaj malpeza filmo, ĝi multe pensigas nin pri la rolo de virinoj en la mondo kaj multe korduŝas nin.

Kelkaj punktoj kaj diskutoj tie ĉi estas faritaj en video de youtuba kanalo de fama psikanalizisto Christian Dunker, kiu en la video analizas la filmon per la perspektivo de psikanalizo. Ĝi estas tre ĉarma filmo por spekti kun via familio, ĉefe se vi havas filinon. Mi invitas vin spekti ĝin, kaj akompani la aventurojn de tiu pupeto Barbie! Ĝi estas spektebla per HBO Max, sed eblas lui ĝin per la interreto! Poste ne forgesu spekti la videon ĉe la antaŭe menciita kanalo de Chris Dunker - Ne mistrafbla! Bonan spektadon kaj ĝis la sekva filmo!

Anna Lobo de Carvalho



Esperanto-Asocio de San-Paŭlo


Jam tempo estas por (re)aniĝi!

<https://easp.org.br/asocio/filiacao>

Imaga interparolo kun filozoj

TALESO EL MILETO (inter 7-a kaj 6-a jarcento a.K.)

S-ro Taleso, la urbo Mileto, kie vi naskiĝis, en mia epoko situas en lando nomata Turkio. Proksime de tie, en Grekio, tri jarcentojn post via vivo, vivis la filozofo Aristotelo, kiu interalie verkis pri antaŭaj pensuloj. Laŭ li, vi, S-ro Taleso, estis la unua filozofo de la homaro. Gratulon! Ĉu vi fieras pri tio?



Taleso el Mileto

Kiel fieri, se mi eĉ ne scias, kio estas filozofo?

Kompreneble... Fakte Pitagoro kreis la vortojn filozofio kaj filozofo, kiam vi jam estis mortinta. Ne gravas. Estas fakto, ankaŭ, ke vi estis sciencisto, eble la unua. Tamen ne atentu pri tiu vorto. Scienco, sciencisto... Ilia deveno estas latina, Romo estis tute ne grava urbo en via epoko... Mi deturniĝas... Ni revenu al la celo de nia dialogo. Kial vi iris al Egiptio kaj kiel vi malkovris la altecon de la piramido de Keopso?

Mi vojaĝas multe, ĉar mi estas komercisto kaj sciivolema. Egiptio ankoraŭ estas vizitinda lando, kun antikva kaj admirinda kulturo, kie eblas samtempe fari bonajn negocojn, akiri sciojn kaj saĝecon. Fakte mi ne malkovris la altecon de la piramido, mi kalkulis ĝin, simple komparante la ombrojn de la piramido kaj de bastono, kiun

mi fiksis apude.

Ha, tre simple, tamen neniu antaŭe kapablis fari tion. Antaŭ ol vi, S-ro Taleso, la matematikaj problemoj estis solvitaj per provoj, induktive, surbaze de observado en la praktiko. Vi, kreinte teoremojn, revoluciis la matematikon, inaŭgurante la deduktan metodon, per kiu oni alvenas al konkludoj el premisoj, per logika rezonado.

Vi uzas vortojn ne konatajn de mi, tamen eblas kompreni, kion vi volas diri. Per tia rezonado mi antaŭvidis sunan eklipson kaj eĉ okazaĵon, per kiu mi riĉiĝis.

Vi diras, ke vi riĉiĝis, ĉar vi akiris sciojn, ĉu? Rakontu pri tiu okazaĵo.

Ne, per ĝi mi riĉiĝis en komunuza senco, mi akiris monon. Danke al miaj scioj pri la naturo, iam mi antaŭvidis, kontraŭe al ĝenerala atendo, ke en la venonta jaro la olivarboj naskos multe pli abunde. Do mi anticipe aĉetis rikoltojn kaj premilojn. Preskaŭ ĉiuj vendis siajn rikoltojn al mi, kredante, ke mi estas stultulo. Kiam mia prognozo realiĝis, kompreneble mi produktis kaj vendis egan kvanton da oleo.

Brave! Tio montras, ke filozofio kaj mono ne estas aferoj tute apartaj. Tamen mi volas, ke vi parolu iomete pri la esenco de via mondokoncepto. Kvantkam vi estas rigardata kiel la unua pensulo, kiu serĉis raciajn klarigojn por kompreni la naturajn fenomenojn, anstataŭ sin turni al la mitoj, ŝajnas, ke vi iel restis ligita al mitologio, ĉar vi diris, ke “ĉio estas akvo”.

Certe multaj pensuloj post mi pri-traktos tiun aferon pli profunde kaj proponos pli bonajn respondojn.

Okazas, ke mi pensadas pri la origino de ĉio, kaj nenion pli gravan por la vivo mi trovis en la naturo ol akvo, kiu konstante moviĝas kaj ŝanĝiĝas, tamen ne perdas sian unuecon. Sen akvo ne ekzistus plantoj, bestoj kaj homoj. Ĉio, kio sekigiĝas, mortas.

Kara S-ro Taleso, certe vi pravas pri la graveco de akvo, kaj ankaŭ por antaŭvidi la evoluon de viaj ideoj. Mi dankas pro via afableco kaj petas permeson fini ĉi tiun agrablan konversacion. Nun mi antaŭeniros kelkajn jarojn en la tempo por viziti alian gravulon de la filozofio, ankoraŭ apud la malhelbluaj kaj sunumitaj akvoj de la mediteranea maro.

Ĉi tiu interparolo estis plezuro por mi. Se iam vi diskonigos ĝin al viaj samtempuloj, aldonu almenaŭ du el miaj diraĵoj. Mi proponas la jenajn:

“La plej malfacila afero en la mondo estas koni nin mem kaj la plej facila estas paroli malbone pri la aliaj.”

“Espero estas la sola havaĵo komuna al ĉiuj homoj; tiuj, kiuj havas nenion alian, ankoraŭ ĝin havas.”

Certe mi faros tion, tiuj opinioj ankoraŭ validas por la homoj de la 21-a jarcento. Ĝis!

José Mauro Progiante

Prokrastemo - fenomeno de nia erao

Kun tiom da informoj kaj la tujeco, kiun moder-naj komunikiloj ekpostulis de ni, reliefigis unu el la fenomenoj de nia tempo, nome la prokrastemo. Eble kiel nekonscia rezistado al la samtempeco de multaj taskoj kaj al tujeco, kiun oni atendas en ĉiuj sferoj de la moderna vivo, multaj homoj lasas taskojn kaj plenumas ilin en la vere lasta momento ebla.



por kontroli Fejsbukon aŭ Vacapon aŭ mian retroŝ-ton aŭ novaĵagentejon kaj poste mi daŭrigos mian laboron"). Kaj fine oni pli paŭzas ol efektivas la taskojn.

Foja prokrastigo estas parto de la homo. Foja distriĝo same ne damaĝas, eĉ male, renovigas la elanon

kaj refreŝigas la cerbon. Sed la nuntempa facila alirebleco al amaso da distroj reliefigas kiel la memdisciplino estas des pli grava. Se prokrastemo fariĝas kutimo, venas perdo de labor-kaj vivkvalito. Perdo de kvalito povas rezulti, ekzemple, de nesufiĉa tempo por plenumo de la tasko. Oni mistaksas la tempon necesan kaj ĉi tion oni eble konstatos nur en la efektivigo mem de laboro, antaŭtage de la limdato, eble jam tro malfrue.

Ĉar mi estas unu el tiuj, kiuj suferas de prokrastemo, mi senprokraste verkis tiujn ĉi notojn por via pripensado.

Ne nur oni trolongigas la plenumadon de taskoj, la fenomeno manifestiĝas ankaŭ per la serĉado de intertempaj plezuretoj, des pli kiam tiu tasko estas enuiga aŭ nedezirata. Fojfoja prokrasto estas homa. Ĉio cetera en la universo povas montriĝas pli alloga kaj retkrozado estas la ĉefa ekzemplo ("nur momenteton, mi haltos

Unu el la kaŭzoj de tio nomiĝas memsabotado. Tio okazas al multaj

homoj, kiuj nekonscie kredas sin ne-meritantaj sukcesoj kaj se oni prokrastos kaj liveros malbonan rezulton, tio pravigos nian mankon de merito, kiel memrealiĝanta profetaĵo. Kaj la rezultanta streso estas meritita puno, tion kredas la cerbo. Aliaj kuŝas sur la tasko atendante magian solvon, kiu kompreneble ne venos, anstataŭ la praktiko de nemalofte peniga sed necesa disciplino.

Delicoj de Kapuo

Mi hieraŭ legis en la franca esprimon, kiun oni reprenis en pluraj lingvoj (Charles Dickens uzis ĝin en la angla) – "necesas forlasi la delicojn de Kapuo". Tio estas, forlasu la plezurojn de improvizita, facila kaj ne daŭripova vojo, favore al tio, kio vere necesas fari.

Kapuo estis etruska urbo fondita ĉ. 600 a.K., en la kulmino de la etruska civilizacio. Ĝia nomo en ilia lingvo signifis "urbon de marĉoj". Kapuo estis transprenita de romianoj ĉ. 300 a.K., agrabla kaj vigla urbo, kun moderna amfiteatro preskaŭ tiel granda kiel la Koloseo en Romo. Kartaganoj ĝin invadis kaj transprenis, sub la estrado de generalo Hanibalo, ĉ. 215 a.K.

Kun la sukcesa regado de tiu sud-itala regiono, Hanibalo decidis doni al



sia armeo ripozon. Tiu prokrasta paŭzeto daŭris... DEK TRI jarojn!!! Rezultis, ke la armeo maltrejniĝis, malvigliĝis kaj estis venkita kiam venis la defio de romianoj. Kvazaŭ futbalteamo en la ĉijara brazila ĉefa futbalturniro, kiu ne dek tri jarojn, sed per 13 poentoj superis la duan teamon. Tiel komforta pozicio dum monatoj perdigis al la teamo en la finaj semajnoj la de jardekoj sopiratan ĉampionecon.

Ĉu kiel tiu teamo vi sabotas vin mem?



James Rezende Piton

(Paulínia-SP)



Parto 2 - Kompoŝtado

Domoj kutime produktas ian kvanton da organika rubaĵo ĉiutage: ovoŝelojn, kafo-rekrementon, restaĵon el fruktoj, grenoj, herboj aŭ vegetaĵoj - nur por citi kelkajn.

La destino de tiu rubaĵo estas ia mistero por multaj urbaj loĝantoj. Kien ĝi iras? Ĉu al ordinara rubaĵdeponejo? kion eblas fari per ĝi?

Ĉi tie en la korto de nia nova domo, pro la starigo de forcejo (La Lampiro n-ro 184, pp 16-18), mi iom esploris pri la temo kaj ĝoje malkovris kiel aliigi kuirejajn restaĵojn al valora kompoŝto por plantoj.

Se tiel diri, la mistero ĉe ni senvaliĝis en la kuirejo mem: la ĉiutaga organika kolektaĵo estas konservata en



hejma kompoŝtado komenciĝas en la kuirejo.

eta rubujo kaj poste metita en fridujon kune kun saketoj de antaŭaj tagoj. Unu fojon semajne mi portas la saketojn al kompoŝtujo, kie la organika materialo restas ripozanta ĝis plena malkomponiĝo.



Sako alterne plenigita per tavoloj da ligno-raspajoj kaj organikaj materialoj.



Tiu organika kompoŝtado subtenata hejme kaj produktata en la korto iel imitas la naturan sterkadon en arbaro, sur kies grundo oni povas observi tapiŝon el falintaj folioj, kiuj post malkomponiĝado fariĝas nutraĵo por tieaj plantoj.

Estas tre agrabla sperto vidi propraokule la kompletigon de natura ciclo: ni rikoltas freŝajn legomojn kaj verdaĵojn en la korto kaj, post ilia preparo kaj konsumado, ni konservas la organikajn restaĵojn kiuj siavice aliĝas al kompoŝto por ree sterki la legombedojn.

Se vi ŝatas ĝardenadon kaj havas apartan lokon en la korto, tiam vi devas provi mem kompoŝtigi. Per tio vi povos maloftigi uzadon de pesticidoj, ŝpari monon kaj plibonigi la grundon de via korto.

Kompoŝtado en sakoj

El diversaj metodoj de kompoŝtado mi bone adaptiĝis al tiu en sakoj. La laboro estas simpla: oni alterne aranĝas unu tavolon da kuirejaj restaĵoj kaj alian da sekigita materialo (lignaj raspajoj aŭ sekaj folioj) ĝis plenigo de la sako. Post ties plenigo oni lasu ĝin ripozi prefere en ombro dum kelkaj monatoj.

De tempo al tempo necesas turni la malkomponiĝantan materialon por aerumi ĝin kaj laŭbezone aldoni iom da akvo. La kompoŝtamaso estas preta kiam ĝia aspekto similas al tiu de bruna tero kaj la temperaturo ene de la sako estas sama al tiu de la ekstero. Ĉe tiu punkto sufiĉas kribri la kompoŝtaĵon kaj ekuzi aŭ stoki ĝin.



Pliaj sakoj da organika materialo atendantaj malkomponiĝon.



Akumado de la kompoŝtamaso. De tempo al tempo necesas kontroli la temperaturon kaj humidecon ene de la sakoj.

Kompoŝtado en lignaj kaĝoj

Malkiel ĉe la sako-metodo, ĉi tie, anstataŭ kuirejaj restaĵoj, mi uzas planto-restaĵojn precipe el falĉado de trudherboj kaj detranĉado de arbo-branĉoj kaj folioj. Per tiu metodo la malkomponiĝo de la vegetaĵa materialo okazas iom malpli rapide kaj la kompoŝtamaso postulas iom pli da zorgado.

Post kelkaj monatoj da malkomponiĝo en ligna kaĝo planto-restaĵoj nekredeble aliiĝas al fekunda ter-aspekta sterkaĵo por plibonigi la grundon de legombedoj kaj tiel kompletigi la naturan ciklon el la kuriejo revene al la korto.



Kribrado de la kompoŝto el vegetaĵaj materialoj post kelkmonata malkomponiĝo en ligna kaĝo.



Post plena malkomponiĝo la kompoŝtaĵo havas aspekton kaj odoron de fekunda tero.

José R. Tenório

Pluen



Maria Nazaré Laroca

Esperanto, amletero
 liverita al la homaro
 de l' amema kuriero
 el la kor' de ĉies Frato!
 Sed min trafis la donaco
 nur en la jar' du mil tri,
 kiam voĉo en la kapo
 aŭdiĝis tute surprize.
 Pli ol propono jen ordono
 por nepra studo de l' lingvo
 internacia, por ĉiam!

Malfermiĝis horizonto
 per la magia ŝlosilo!
 Mi traveturis la mondon
 kaj kun multoj amikiĝis.
 En pluraj mondaj kongresoj
 partoprenis mi plezure,
 kaj verdan kulturon festis
 kun granda ĝojo kaj ĝuo!

Emociajn travivaĵojn
 mi spertis en Bjalistoko
 kaj en Bulonjo-ĉe-Maró,
 ja neforgesebla gloro!

Tamen venis sortobatoj,
 kaj mia vivo ŝanĝigis;
 pro la dolor' senkompata
 al mi ne eblas foriri.

Ho, ve! Kia elreviĝo!
 Ne plu kongresaj ĉeestoj,
 sed l'aferon mi daŭrigas
 entuziasme, amplene,
 per poezia verdiĝo.

Maria Nazaré Laroca

Inteligenta domo

Post nia lasta rekontiĝo en nia Pasargada Esp-o-klubo, ni bezonis kunveni unu fojon pli, ni devis renkontiĝi denove, ĉar urĝaj administraj decidoj tion postulis. Sed, io amuza okazis ĉe ni. “Sed kie estas la ŝlosilo de la enirpordo?” Surprize ni ĉiuj staris antaŭ la domo de la sidejo sed neniu kunportis ŝlosilon por malfermi la pordon. Nia kara prezidanto forgesis la ŝlosilon, mi ne kunportis la mian. Ho Dio! Do, ni ridadis, diskutadis rapide pri la plej urĝaj aferoj kaj foriris. Sed tiu okazintaĵo instigis nin trovi alian solvon por la problemo.

Revenante, unu semajnon poste, Blanketo invitis sian amikon, Prof-ron Laŭo. Li estas esploristo pri la enkonduko de inteligenteco en urbojn, konstruaĵojn kaj domojn, kaj prezentis al ni la veran revolucion kiu alvenas al la mondo. Jen liaj paroloj:

— Karaj estraranoj, babilante kun mia amiko Blanketo, mi sciis pri tiu okazintaĵo, la forgeso de ŝlosilo, kaj ni



interkonsentis ke estus bone alporti la esperantan klubon al novaj tempoj. Jes! Kial ne inteligenta domo por vi ĉiuj? Via loka cifereca sendrata reto funkcias tre bone kaj estas interkonektita kun la interreto sen ia ajn problemo.

La koncepto inteligenta hejmo faciligas la aŭtomatigon de rutinaj taskoj. Por krei hejman aŭtomatigon, aparatoj devas esti konektitaj al kontrolcentro. Per ĝi hejmaj aparatoj, klimatizilo, ventoliloj, lumsistemoj, same kiel aŭdsistemo kaj video aŭ sekurecaj sistemoj, povas komuniki unuj kun la aliaj kaj povas esti regataj de malproksime, ie ajn, per komputilo

aŭ inteligenta poŝ-telefono. Sed, iru ni unue al la problemo kiun vi trovis. Jes, ĝi estas simpla afero. Ni povas solvi ĝin pere de elektronika seruro. Certe vi demandas: ĉu ĝi estas sekura? Jes, mi diras. Alivorte, vi ĉiam estos certa, ke nur la persono kun la registritaj fingrospuroj aŭ pasvortoj havos aliron al la esperanta sidejo. La estraranoj ne plu bezonas zorgi ĉu iu ŝlosis la sidejon aŭ ne kiam ĉiuj forlasis ĝin. Je la fino de kunveno oni devas nur fermi la pordon por ke la seruro aŭtomate aktiviĝu. Kiam vi revenas, ne necesas memori pri ŝlosilo, ĉu ne? Ĉar biometrio aŭ registritaj pasvortoj povas malŝlosi ĝin.

Alia punkto, kiam ni alportas inteligentecon, ĝi estas la ebleco pli bone eviti la elspezon de energio! Vi prezidanto, povas alĝustigi la lumon en ĉiu angulo de la domo, rekte per la poŝ-telefono aŭ eĉ per inteligenta horloĝo, kie ajn vi estas. Jes, inter la plej alireblaj aparatoj estas inteligentaj bulboj, kiuj povas esti kontrolataj per speciala programo de via poŝ-telefono. Do eblas monitori kaj tiel optimumigi la luman konsumon ekde via aparato en reala tempo, certigante efikecon kaj kostoredukton.

Multaj aliaj punktoj. La varmo estas vere malagraba nuntempe, ĉu ne? Sed, kiel uzi inteligente la klimatizilon?

La sistemo permesos al vi difini agordojn laŭ viaj preferoj kaj, surbaze de ili, ĝi funkcios aŭtomate.

Fine, post elmonro de multaj aliaj mirindaĵoj, la afero estis la investo. Jes, starigi inteligentan sidejon ne dependas nur de intereso de la estraranoj, sed de la disponebla buĝeto. Kaj ni decidis komenci per la plej simpla, la elektronika seruro, kaj malrapide investi en la aliaj punktoj prezentitaj. Dirite kaj farite. Nia prezidanto estis tre kontenta, ĉar la pordo malfermiĝas rapide tuj post la atesto de la aŭtentikeco de lia voĉo. Sufiĉas diri nur la nomon de la persono, jam registrita, por ke la pordo malfermiĝu.

La problemo estis solvita, kaj ni eniras, ĉi jare, novan tempon.

davidesperantista@gmail.com



La pilgrimanta sanktulo

Dirce Sales

Apenaŭ la nokto kovris la urbon per la littuko de dormo – la urbo estis eta juvelo inter la montaroj – la sceno ripetiĝis:

Ĉiam sen ia urĝo, li malsuprenvenis de sur la piedestalo, sur kiun la homoj insistis meti lin, kaj iris laŭ la proksimaj stratoj al plej malprobablaj lokoj – tiuj forgesitaj de la socio.

Dum sia pilgrimado, li sciis, ke en la lasta kabano, ĉe la nepavimita vojo, la pordo jam estas duone malfermita, nur apogita per malgranda benketo, tamen li, perfekte diskreta persono, anoncis sin per tri frapetoj.

— Vi rajtas enveni, mia baptopatro!
Bonvenon!

— Kiel vi fartas?

— Laŭ la volo de Dio. Vian benon.

— Dio vin benu, filino mia.

Ŝi estis Antonia Maria, baptofilino de Sankta Antono kaj Sankta Maria, ĉar



ŝia patrino ne povis pagi la bapton, kaj petis la ĉielan bapton por sia unusola filino.

— Vi malsatas, ĉu? Vidu la manĝon, kiun mi preparis por vi.

— Por ni ambaŭ, Antonia — li alĝustigis per milda, bona rideto.

Kaj Antonia forprenis la puntumitan tablotukon – ornamitan per krucoŝtira punkto, kiel estas tradicie en iuj lokoj en nia grandega Brazilo –, kaj oni povis ekvidi la etan poton plenan de frititaj buletoj, nome bongustaĵo alnomata de popolanoj “buletoj el pluvo”, kiun oni simple preparas per miksaĵo de tritiko, sukero, akvo, ovo, vinagro kaj pinĉo da salo. La miksaĵon oni metas en varman oleon per ne-grandaj kulerokvantoj, ĝis ili alprenas la formon de orkoloraj buletoj, tiel plezurigaj, ke eĉ la Minotaŭron ili delogis, pro la magiaj manoj de Onjo Nastasja, laŭ rakonto de Lobato*.

Kaj Antonia ne forgesis la densan, aroman kafon, kun sukero, kompreneble!, kiun ŝi preparis kun amo por tiuj, kiuj memoris viziti ŝin en tiu loko fora kaj forgesita, eĉ de la homoj en la urbo, ĉiam okupitaj kaj rapidemaj...

La kafo, priservita en ladaj tasetoj, formis ĉarman koloron sur la tute blanka tablotuko.

Kaj apud la agrabla varmo de la lignoforno, ili du longe interparolis...

Antono ĉiam estis bona aŭdanto – malofta afero nuntempe –, sed bonega interparolanto. Kaj li bele parolis, alprenante la simplan manieron de homoj, kiuj trovis tempon por aŭdi lin.

Antonia Maria kutimis trinki tiujn vortojn, kiuj foje havis ian guston de akvo lasita en argila poto, sub la nokta roso, ĉu vi komprenas? Freŝa kaj kun neforgesebla gusto!

Kiam la tago estis komenonta sian aktivadon kaj invitonta la nokton al aliaj lokoj, tiam venis la momento, kiam Antono revenis al sia loko.

Kaj tion li faris kun plezuro, laŭ sia funkcio aŭdi kaj ankaŭ legi, ĉar en delikata maniero li legis ĉiujn leteretojn, foje eĉ longajn leterojn!, kiujn oni al li sendis, kaj per pacienco de vera sanktulo!

Nu! Li ja estis sanktulo!

Vi komprenas min.

Kaj kiel mi scias pri ĉio tio? Do, ĉar mi estas tre antikva najbarino de la Tero, mi tuj ekscias ĉion, kio okazas tie, kaj mi amas rakonti, kiam mi trovas pretajn orelojn!

Tiel parolas la Plena Luno, kun siaj magioj kaj misteroj, kiuj nin ravas de jarmiloj... Kia sorĉistino!

(Esperantigis P. S. Viana)

* Aludo al infanlibro de la brazila aŭtoro Monteiro Lobato, nome “La dek du heroaĵoj de Herkulo”, en kiu la Minotaŭro estas delogita per bongustaĵoj preparitaj de talenta kuiristino Onjo Nastasja.


Ankoraŭ pri mensa sano

La Ŝtato ne liveras mensan sanon. Liveras nur flegadon post la perdo de ĝi. Do vi mem bezonas kuraci vin. La gefamilianoj, la geamikoj, la kunuloj, la najbaroj, ĉiuj, kaŝadas siajn neŭrozojn. Aliuloj klopodas kaŝi siajn psikozojn, fobiojn, kompulsiojn, sed ne sukcesas.

La reganta morala malordo kunlaboras kun la aktualaj teknologioj, komplikas la mensajn malsanojn, endanĝerigas la estontecon de la socio!

Laŭ OPAS/MSO, en la mondo, la cifero de memmortigoj estas po 1 post 45-minuta intertempo! La depresiuloj sumiĝas je pli ol 322 milionoj da homoj! En nia lando, dum la jaro 2022, sin mortigis 16.262 homoj, kio lokas Brazilon en la 8-an pozicion inter la landoj kie pli da memmortigoj okazas nune.

La natura korpemado de la socia vivo jam atingas 9,3% de la brazilanoj, t.e. 18,6 milionojn da homoj. La sociaj retoj, en interreto, sukcesas izoli



milojn da homoj, kondukante ilin al depresio. Tragedie!

Ŝajnas al mi ke la aŭtonomio, la memregado, per siaj propraj moralaj kaj intelektaj meritoj, estas la sekura vojo por venki la depresian ondon. Elekti la fratecon, la veran socian kunvivadon, la konstantan gimnastikon, ankaŭ helpas nin en la longedaŭra mensa sano.

Lingvaj Respondoj de Francisco Wechsler



Demando

En la sekvantaj frazoj, ĉu oni devas uzi la adverban aŭ la adjektivan finaĵon?

Mi rigardas grava/grave studi la Historion.

Mi konsideras necesa/necese koni la Historion.

Mi taksas nepra/nepre konsulti la Historion.

Respondo

Koncize: ambaŭ formoj estas uzablaj, tamen... pliajn detalojn legu ĉi-sekve.

Laŭ la Fundamento, oni devas uzi adverbon, kiam ĝi priskribas infinitivohavan subjekton:

Resti kun leono estas danĝere
(Ekzercaro, §7).

Morti pro la patrujo estas agrable
(Ekzercaro, §20).

Laŭ la sama principo, oni devas uzi adverbon, kiam ĝi priskribas frazparton rolantan kiel subjekto:

[...] **estas utile, ke** ĉiuj leteroj al ambaŭ prezidantoj [...] estu direktataj al ili per la “Centra Oficejo”. (Leteroj de Zamenhof).

Ne estas grave, ke oni naskiĝis en anasejo [...] (Fabeloj de Andersen, 1916).

Simile, kiam oni celas priskribi frazparton rolantan kiel objekto (kiel en la ekzemploj de la demando), oni devas uzi adverbon:

Tiun ĉi penson [...] ni **trovis nun necese ripeti** ankoraŭ unu fojon. (Originala Verkaro, p.106).

Dank' al [...] kelkaj flankoj de la lingvo, pri kiuj mi **trovas superflue** tie ĉi detale **paroli**, la lingvo fariĝas eksterordinare facila. (Fundamenta Krestomatio, p.233)

Nek Snitchey nek Craggs trovis **utile batali** malkaŝe kontraŭ la fluo de tiu ĉi kolero. (La Batalo de l' Vivo)

Tiu homo iris el la urbo, el Bet-Leĥem de Jehuda, por ekloĝi tie, kie li **trovas oportune** [ekloĝi] (Juĝistoj 17:8).

Tiun ĉi principon aplikis ankaŭ aliaj aŭtoroj:

Kial oni ĉe vi **opinias nekredinde, ke** Dio levos la mortintojn? (Agoj 26:8)[...]

[...] *persono deziranta establi socion kian ni mem faras* **trovas necese iri** al demokratia civito [...] (Broadribb, La respubliko)

[...] *li okaze trapasis la hejmmregionon kaj* **trovis oportune viziti** la hejmon [...] (Engholm, Homoj sur la tero, 1932)

[...] *mi ne* **trovis necese aĉeti** lokbileton [...] (Matthias, Fajron sentas mi interne, 1990)

Tamen Zamenhof kelfoje uzis la adjektivan finaĵon en la perverba priskribo de frazparto rolanta kiel subjekto:

[...] *por mi persone* **estus** kompreneble multe pli **oportuna teni** la sorton de la

lingvo en miaj manoj. (Aldono al la Dua Libro, 1888)

[...] **estus** tre **utila** tute **precizigi** kaj klarigi la rolon de la Oficejo. (Leteroj de Zamenhof II, 285/24)

La gazetoj ne **trovas necesa eniĝi** en tion, pri kio ili skribas. (Esenco kaj Estonteco)

Sed **kunligi** jam antaŭe la sorton de l' lingvo internacia kun la estonta kongreso, **estus** tre **malprudenta**. (Originala Verkaro, 31/33)

Ĉu ne **estas ebla, ke** ni kompreniĝadu per alia lingvo. (Hamleto, Akto V, Sceno 2)

Li ankaŭ iafoje uzis la adjektivan finaĵon en perverba priskribo de frazparto rolanta kiel objekto:

[...] *kaj la fina formo* [...] *devas esti leĝdonanta,* [...] *se la kongreso eĉ* **trovas necesa ŝanĝi** la lingvon ĝis nerezonebleco. (Aldono al la Dua Libro)

[...] *la sola ŝanĝo,* *kiun mi* **trovas necesa fari** mem, estas: [...] (Aldono al la Dua Libro)

Pro evito de malkompreniĝoj ni **trovas necesa doni** la sekvantajn klarigojn: [...] (Aldono al la Dogmoj de Hilelismo).

mi **trovas bona konigi** la pruvosignojn kaj miraklojn. (Daniel 4:2)

Ĉar li estis en uniformo, li **opiniis nekonvena** tiel laŭte **krii**. (Fabeloj de Andersen 1)

Sed la ŝtrumpa rubando, kiu estis tre hontema kaj sinĝenema, **opiniis nekonvena respondi** pri tio. (Fabeloj de Andersen 3)

Por fari pli klara la perverban priskribon de frazparto rolanta kiel objekto, Zamenhof iafoje aldonis la vorton ĝin kune kun adjektivo. Laŭ PMEG, nuntempe oni uzu tion anstataŭ ĝin en tiaj frazoj.

[...] se la Akademio **trovus ĝin necesa anstataŭigi** en ili la “uj” per “i”, mi tion ne malkonsilus; (Lingvaj Respondoj)

[...] ĉu vi, kara Mario, **trovas ĝin konvena, ke** juna virino [...] restu la tutan tagon ĉe la sama tablo kun kelke da junaj viroj? (Marta)

Ĉe aliaj aŭtoroj, tia priskribo ankaŭ uzas adjektivon:

[...] ni ne **trovis oportuna konfidi** niajn karajn vivojn al “Ternlands” (Langlet, Vojaĝimpresoj, 1895)

Tio ŝajnis stranga al Ramzes mem, ĉar ĝis nun li neniam **opiniis necesa sin detenadi**. (Kabe, La Faraono)

Ĉu tial, ke mi estis en templo, mia bankiero ankaŭ **trovas necesa konsiliĝi** kun la dioj? (same)

[...] **oportuna estus sendi** la multajn beratnuojn, akvumistojn kaj konfiskistojn al la kamparoj [...] (Szathmári, Vojaĝo al Kazohinio)

Mi **taksas necesa starigi** kun li [...] rilaton de decidemo. (Monde Diplomatique en Esperanto)

La biografo **juĝis oportuna**, [...] **enigi** en la libron serion de sinistraj fotoĵoj [...] (same)

Kelkfoje oni renkontas ankaŭ ĉe modernaj aŭtoroj la uzadon de *tion* en la perverba priskribo de frazparto rolanta kiel objekto, ĉu por emfazo, ĉu por plia klareco:

[...] multaj homoj **konsideras tion nekonvena, vidi** la patrinon de la imperiestro sidanta sur la podio apud sia filo. (Löwenstein, La memoraĵoj de Julia Agripina)

Mi persone sekvas la rekomendon de PMEG, nome: 1) uzu adverbon por la perverba priskribo de frazparto rolanta kiel subjekto; 2) uzu adjektivon kun *tion* aŭ adverbon por la perverba priskribo de frazparto rolanta kiel objekto.

Noto: PMEG = *Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko*, v. 15.4 (Wennergren, 2023)

Quer aprender Esperanto?

**PROGRAMO
MIA AMIKO**



pma.esperanto.org.br